

La etapoj de la svisa federalismo, III

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 511, 1981.09.03 & 05

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj semajnoj ni rigardas al la historio de la svisa federalismo por malkovri ĝian instruon.

Ni jam vidis, ke la ideo mem, sur kiu estas fundamentita la Ligo inter Uri, Schwytz kaj Nidwald, estas la principo de la arbitrado. Le rezigno memjuĝi la proprajn kaŭzojn estas vakcino kontraŭ nacia ŝovinismo. Okaze de arbitracio de konflikto inter kamparanoj kaj aristokratoj la juna Svisa Ligo malkovris komence de la dekkvina jarcento, ke federacio povas ekzisti, nur se la diverseco estas akceptata kiel principo kaj idealo. Federalismo signifas rezignon al la volo regadi la ceterajn, profite al la volo al solidareco. Neegaluloj devas kondukti kiel egaluloj. Urba civito egalas kamparanan civiton. Aristokrata civito egalas demokratan civiton. Granda civito egalas malgrandan civiton. Riĉa civito egalas malriĉan civiton. Ne estas facile kondukti laŭ tiu ĉi principo de la jura egaleco de la malegaluloj, kiu estas la fundamento de ĉiu federacio.

A.- La grava konflikto kun Zürich, kiu ne volis obei al tiuj ĉi principoj, kondukis meze de la dekkvina jarcento al la instruo, ke ĉiu konflikto necese finiĝas per arbitracio. Do, kial uzi perforton, se post la uzo de armiloj oni tamen devas kunsidi por diskuti? En la Svisa Ligo, pli kaj pli la kverelantoj tuj akceptis sin submeti al arbitraj tribunaloj, kies funkciado iom post iom perfektigis.

C1.- Dum la dekkvina jarcento la Svisa Federacio konis novan teritorian ekspansion. En okcidenta parto de nuna Svislando troviĝis vastaj teritorioj, kiuj apartenis al la Dukoj de Savojo kaj de Burgundlando. Tiuj teritorioj estas iom post iom konkerataj, sed ili ne formas novajn kantonojn. Ili formas koloniojn, kiujn administros je sia profito la svisaj civitoj.

A.- Tiuj teritoriaj konkeroj havas negativan influon en la federacio mem. Ili vekis ĉe la junaj svisoj avidemon al riĉaĵoj milite konkeritaj. Pli kaj pli la junuloj forlasas sian landon kaj profesion por fariĝi dungsoldatoj.

Cl.- Kaj en la svisa federacio mem junularoj formas armeojn, kiuj atakas vilaĝojn kaj ruinigas tutajn kamparojn. Dietaj kunvenoj montriĝas nekapablaj por solvi tiujn novajn problemojn. En Stans la dietanoj decidas, ke ili povas nenion decidi. Tiam el la vilaĝo Flüe aŭdiĝas la konsiloj de ermito Nikolao. Antaŭ ol esti ermito, Nikolao estis vilaĝestro. Li komprenigas al la Dietanoj, ke pro manko de centra povo Svislando ne estas farita por militaj konkeroj.

A.- Dank' al la saĝaj konsiloj de Nikolao de Flüe, la Svisa Federacio trovas novan ekvilibron asimilante 5 novajn kantonojn. Ekde 1513 Svislando estas 13-kantona Federacio. Inter la novaj kantonoj, Appenzell kaj Basel havas la devon resti neŭtralaj okaze de interkantonaj konfliktoj.

Cl.- Tiu kvietiĝo, kiun la svisoj ŝuldas al la saĝo de Nikolao de Flüe, helpas al la svisa federalismo travivi sian plej malfacilan krizon. En la 16-a jarcento naskiĝas nova spirito, kiun ni nomas interkantonismo. La ekzisto de Svislando konkretiĝas en interkantonaj konkursoj. Tiuj interkantonaj gimnastikaj festoj pensigas al la hodiaŭaj internaciaj sportaj olimpiadoj.

A.- Oni povas fari certan paralelismojn inter Svislando en la 16-a jarcento kaj Eŭropo en la 20-a jarcento.

a) Interne de la Ligo ĉiu vidis antaŭ ĉio la apartenon al la propra lando. Ili estis Schwytzanoj, Bernanoj, Appenzellanoj. La sento esti sviso ne ekzistis.

b) La kantonoj formis inter si komplikajn aliancojn kaj ekzistis koloniaj teritorioj.

c) Ĉiu ŝtato havis propran juran sistemon. Eĉ ne komuna mono ekzistis,

d) Ekzistis lingva diverseco.

e) Sed el la ekstero oni rimarkis komunajn trajtojn, kaj la svisoj mem, kiam ili forlasis la ligojn por soldatdeĵori profite al fremda armeo, sentis tiujn ĉi komunajn trajtojn, same kiel hodiaŭ la eŭropanoj ĉefe konscias pri sia eŭropaneco, kiam ili forlasis sian kontinenton. Interne de ĝi, ili estas antaŭ ĉio anoj de preciza nacio.

CL.- La lasta granda krizo en la naskiĝo de la Svisa Federacio havis religian aŭ ideologian karakteron. La pastro Ulrich Zwingli, kiu predikadis en la katedralo de Zŭrich, diskonigis la religiajn vidpunktojn de Martin Luther. Zŭrich fariĝis protestanta centro.

A.- E1 Ĝenevo aŭdiĝis alia reformema voĉo, tiu de Johano Calvin.

CL.- Inter la adeptoj de la tradicia religio kaj tiuj de la nova fido la konfliktoj tagon post tago akriĝis. Bern protestantiĝis, kio ne forlasigis al ĝi ĝiajn konkerajn projektojn. Ĝi sendadis la reformiston Guillaume Farel prediki la novan kredon en la konkerotajn teritoriojn, kaj militaj ekspedicioj iris poste protekti la protestantajn komunumojn kontraŭ la katolika danĝero. Bern tiel konkeris vastajn koloniojn en la franclingva lando Vaud.

A.- Ĝenerale restis katolikaj la demokrataj civitoj en la alpoj, kaj ĝenerale fariĝis protestantaj la aristokrataj civitoj en Mezlando kaj Ĵuraso.

CL.- La religiaj konfliktoj ĉefe akriĝas en la koloniaj teritorioj. La Dieto estas senpotenca por ilin solvi, ĉar la ambasadoroj de la katolikaj civitoj rifuzas agnoski la valoron de la ĵuroj de la protestantoj. Tial la ĵuro pri fideleco al la pakto, kiu estis renovigita ĉiujn kvin jarojn, ne estos renovigita dum pli ol du jarcentoj.

A.- Tute nature, dum la Dieta povo malfortiĝas, la kantonaj konsilantaroj plifortiĝas. La Berna konsilantaro pli kaj pli okupas ĉeflokon en la protestanta Svislando, dum tiun ĉi rolon ludas Luzern por la katolika Svislando.

CL.- Oni alvenis al diversaj rimedoj por solvi la religiajn konfliktojn :

a) En Appenzell, oni dividis la kantonon. Unu duonon ricevis la katolikoj, la alian la protestantoj, kaj ĉiu ŝanĝis sian loĝlokon laŭ sia fido.

b) En Glarus oni formis du registarojn, du leĝajn sistemojn kaj du horarojn por la di-servoj, kiuj disvolviĝis en la sama preĝejo. Naskiĝis la ideo de la egaleco inter ambaŭ religioj.

c) El multaj kantonoj, se oni ne apartenis al la plimulta fido, oni devis elmigri.

d) En la kolonioj, kiujn vice regadis la konkerintaj kantonoj, akriĝis la religiaj konfliktoj, ĉar la regantoj volis trudi sian religion, la koloniigitoj fine ribelis kaj okazis 4 interkantonaj konfliktoj inter 1529 kaj 1712, du en Kappel kaj du en Wilmergen. Dufoje gajnis la katolikoj dufoje la protestantoj. La arbitrado de Rodolf Wettstein, la urbestro de la neŭtrala kanto Baselo kondukis al la paco de Aarau, kiu trovas sian inspiron en la eksperimento de Glarus: ĉiuj komunumoj, konsilantaroj, tribunaloj en la koloniigitaj teritorioj havas du sekretariojn: unu kiu reprezentas la katolikojn, la alia por la protestantoj. Oni alvenas iom post iom al ekregado de vera religia libereco. Kaj tiuj teritorioj pro tio ebligas la organizadon de

interkantonaj kunvenoj. Ankaŭ la Dietaj kunsidoj pro tio pli kaj pli disvolviĝas en tiuj religie neŭtraligitaj teritorioj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond rememorigos, kiel transformiĝis la konfederacia ligo al vera federacio. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*